

Михаил Лермонтов,
La morto de la poeto
tradukita de Konstantin Gusev

...

Михаил Лермонтов,
Der Tod des Dichters
tradukita de Friedrich von Bodenstedt

...

Pereis li, poet' de justo,
 Murdita per la kalumni',
 Kun peza plumbo en la brusto
 Kaj venĝavido mortis li! ...
 Ne povis la animo luma
 Subiĝi al la malhonor',
 Li sola kontraŭ fals' monduma
 Ribelis ... Kaj li estas for!
 Murdita! ... Do por kio ploroj,
 De l' povraj laŭdoj tarda ĥor'
 Kaj sinpravigoj de l' sinjoroj?
 Pro fato li jam estas for!
 Kaj ĉu ne vi kolere pelis
 La noblan kanton de liber',
 Elblovi incendion celis
 El la ĵaluzo – nur fajrer'?'
 Do ĝoju ... Mutas bardo nia,
 La bonon rompis la malbon'.
 Ne lumas plu la stel' genia,
 Forvelkis la solena kron'.
 Murdinto lia senkompata
 Ekpremis feron de la ĉan',
 La koro vanta batis glate,
 Neniom tremis tiu man'.
 Kaj ĉu ne miro, ĉu ne strango?
 Pelata per la sort' migrant',
 Nomadis li en nia land'
 En serĉo de feliĉ' kaj rango,
 Ofende mokis pli kaj pli
 De nia tero lingvon, moron
 Kaj malestimis nian gloron,
 Ne sciis en la sanga horo,
 Sur kion levis sian manon li! ...
 En tombo kuŝas jam la bardo,
 Samkiel tiu, kiun li kun ardo
 Prikantis sorĉe en la versroman' –
 Kantisto de bonkoro kaj bonfarto
 Murdita per la senkompata man'.
 Por kio de la pac' kaj simpla vilaĝloka
 Enpaŝis mise li al la mondum' sufoka
 Por la sincera sent' kaj liberema saĝ'?'
 Por kio premis li la malamikajn manojn,
 En la envia rond' serĉante la kompanojn,
 Li, kompreninta homojn de l' junaĝ'?'...
 Anstataŭ simpla kron' al li surmetis ili
 La kronon dornan, nur kun laŭro por ornam' –
 Ĝi devas kvazaŭ ĉiam brili,
 Sed kaŝe piki, piki jam;
 Venenis liajn lastajn horojn frido,
 Malica flustro mokis lin, kaj jen
 Li mortis kun la vana venĝavido,
 Kun kaŝa disreviĝo kaj ĉagren'.
 La kantoj de mirinda brilo
 Ne sonas jam sub la ĉiel',
 Malhelas lia mortazilo

Der Dichter wollte seine Ehre rächen,
 Die er durch giftiges Wort verletzt geglaubt,
 Da traf ihn selbst das Blei, sein Herz zu brechen,
 Zu beugen sein gewaltig Haupt. ...
 ... Und Manche jetzt frohlocken, daß er fiel,
 Und rühmen gar den Mörder, der sein Ziel
 So gut getroffen, und im kalten Muthe,
 Fest, ohne Zittern, that den Mörderschuß,
 Der unser Land geröthet, mit dem Blute
 Des liederreichen Genius. ...
 ... Ein Abenteurer kam er aus der Ferne,
 Er nahm kein Herz mit sich, ließ keins zurück –
 Rang sucht' er bei uns, Titel, Ordenssterne,
 Denn unverständlich war ihm andres Glück,
 Er fand was er gesucht in unsrer Mitte,
 Er fand bei uns ein zweites Vaterland –
 Sein Dank war: daß er sonst auf jedem Schritte
 Was ihm begegnete, verächtlich fand.
 Fremd blieb er unsrer Sprache, unsrer Sitte,
 Das Volk war ihm ein Gegenstand des Hohnes,
 Er suchte keine Gunst als die des Thrones...

*Traduko de la Rusa poemo "Смерть поэта" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de KONSTANTIN GUSEV (†1980-11-09).*

Arg-951-1917 (2013-12-15 10:56:39)

Tiu ĉi poem-esperangigo troviĝas en la retejo http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/morto_poetou.html.

*Traduko de la Rusa poemo "Смерть поэта" de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de FRIEDRICH VON BODENSTEDT (*1819 – †1892).*

Arg-951-1918 (2013-12-15 20:30:08)